**Esperanto Rheinland-Pfalz**
Johannes-Kirschweng-Strasse 11
D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler
**Esperanto-Reinlando-Palatinato**

# 69a Esperanto Rejnlando-Palatinato (3-2017) dato: 2017-11-09

Enhavo

**1. Zamenhof-tago en Treviro**
**2. Esperanto partoprenos en la jam tradicia Mainzer Büchermesse**
**3. Luminesk'**
**4. El la 95a Germana Esperanto Kongreso fariĝas Trilanda Esperanto-kongreso en Zweibrücken**
**5. Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Treviro**
**6. Esperanto en den öffentlichen Bücherschränken in Rheinland-Pfalz**

**1. Zamenhof-tago en Treviro**
Christoph Klawe invitas al festo honore al L.L. Zamenhof. La vesperan feston okazos vendrede, la 15a de decembro (Zamenhoftago). La al tiu festa vespero li kaj Esperanto RLP invitas ĉiun esperantistoj kaj amikoj de Esperanto en kaj ekster nia ferderacia lando.
Ni renkontiĝos je 18.30 h en gastejo, centre de Trevirio, tuj apud la katedralo:
Weinstube Kesselstatt
Liebfrauenstraße 10
54290 Trier
Bonvolu anonci vian venon retpoŝte al Christoph (c.klawe@web.de).

2. **Esperanto partoprenos en la jam tradicia Mainzer Büchermesse.** Wolfgang Schwanzer (Esperanto-Buchversand) informas, ke lia libroservo reprezentos niajn lingvon kaj kulturon sur la jam tradicia librofoiro de Majenco (Mainzer Büchermesse), kiu okazos la 18an ĝis la 19an de novembro en la Rathaus de la urbo Mainz. Li ofertas esperantajn librojn kaj informas per prelegetoj pri Esperanto. Pliajn informojn vi trovas ĉi-tie:
http://www.mainz.de/kultur-und-wissenschaft/literatur/buechermesse/mainzer-buechermesse.php

http://www.mainz.de/kultur-und-wissenschaft/literatur/buechermesse/mainzer-buechermesse.php?sp-mode=eventdetail&sp-detail=114808&sp-detail-date=174835
kaj
https://www.facebook.com/MainzerBuechermesse/
Kiel speciala servo li ofetas, ke vi povas antaŭe mendi librojn en sia retejo
www.esperanto-buchversand.de
kaj li transdonos ilin dum la foiro.

**3. Luminesk'**
La tria, Luminesko okazos dum la jarŝanĝo 2017/18 en la vestfalia urbeto **H**de la 27a de decembro 2017 ĝis la 3a de januaro 2018. **El la 95a Germana Esperanto Kongreso fariĝas Trilanda Esperanto-kongreso en Zweibrücken**
Kiel Oliver Walz, la ĉefa organizanto de la pentekosta aranĝo en Zweibrücken, ĵus informis, ke la renkontiĝo estos la komuna kongreso de la la francaj, luksemburgaj kaj germanaj Esperantistoj.Temo de la kongreso estos „**Esperanto - tutmonde ligita**". Pliajn informojn vi

trovos en Esperanto aktuell 5/2017, paĝo 16. Aliĝu laŭeble baldaŭ, la hotelĉambroj de Zweibrücken ne estas tre multnombraj. La retan kaj paperan alliĝilojn baldaŭ pretos.

**5. Internacia Medicina Esperanto Kongreso (IMEK) en Treviro**
Christoph Klawe informas, ke la 21a IMEK(Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso) okazos de la 12a ĝis la 14a de sepembro 2018 en Treviro. Pliajn informojn vi trovos en la cirkulero Esperanto-RLP 1/2018.

**6. Esperanto en öffentliche Bücherschränken in Rheinland-Pfalz**
Por informi pri Esperanto ni aĉetis favorpreze kelkajn ekzemplerojn de la fama kaj alloga lernolibro „Esperanto direkt" por distribui al la publikaj libroŝrankoj en nia federacia lando. Nun ni bezonas vian helpon: Se vi konas publikan libroŝrankon en via najbareco, mi petas vin, informi min. tiam vi ricevos de ni la lernolibron por meti ĝin en „vian" libroŝrankon. Via dua tasko poste estos, kontroli, ĉu la libro ankoraŭ estos tie, aŭ ĉu ĝi jam trovis „klienton",.kiu espereble jam komencis lerni nian lingvon.La adresojn de la trovlokoj de tiuj libroŝrankoj vi trovos en la germanlingva Wikipedia. Serĉu sub „Liste öffentlicher Bücherschränke".
..


**Deutscher Esperanto-Bund e.V.**
**Germana Esperanto Ligo r.a.**
**Landa Ligo Rejnlando-Palatinato**
**Landesverband Rheinland-Pfalz**

**Esperanto-RLP**

p.a. Wolfgang Bohr

Johannes-Kirschweng-Straße 11

**D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler**

**Germanujo**

**retpoŝto:** wolfgang.bohr@esperanto.de